# NIA PONTO


Grupo Esperantista
Barrencalle Barrena, 7- 1ª dekstre
E-48005-BILBAO (Hispanio)
Redaktas: J.Miguel García Iturrioz (tepgaitj@lg.ehu.es)

Kunven-tago: Vendredo (7,30-9 h.)
☎ 34-944.164.492
☎ portebla: 696.613.958
esperantobilbao@terra.com
TTT-ejo: http://www.geocities.com/esperantobilbao

**Jar-kotizoj**: Normala: 17 ∈. Speciala: 14 ∈. Familia: 30 ∈.
**BBK-konto: 2095-0141-41-2218001550**

**SEPTEMBRO/OKTOBRO 2004** **Nro. 56 (1/04)**





Malfermo de la 6a EEU-Kongreso. Kongresejo "Eŭskalduna". Bilbao, 25/08/2004.

## ĈIUJARA ĜENERALA KUNVENO.

Laŭ postulas la statutoj de nia Asocio, ni kunvokas ĉiujn ĝiajn anojn partopreni la ordinaran ĝeneralan kunvenon, kiu okazos la **vendredon 1an de oktobro**, je la 19 h. (unua alvoko), aŭ **je la 19,30 h.** (dua alvoko) laŭ la ĉi suba tagordo:

1.- Aprobo, se estas konsento, de la protokolo de la lasta Ĝenerala Kunsido (07/03/2003).
2.- Prezento kaj aprobo de la ekonomia stato de la Grupo: el- kaj en-spezoj dum 2003.
3.- Prezento kaj aprobo, se estas konsento, de la buĝeto por la nuna jaro 2004.
4.- Raporto pri la 6a EEU-Kongreso.
5.- Startigo de novaj kursoj.
6.- Demandoj kaj sugestoj.

## RECUERDA: El viernes 1 de Octubre, Asamblea General, a las 19,30 h. (en 2ª convocatoria), con el siguiente Orden del Día:

1.- Aprobación, si procede, del acta de la Asamblea General anterior (07/03/2003).
2.- Aprobación, si procede, del resumen de gastos e ingresos correspondiente al año 2003
3.- Aprobación, si procede, del presupuesto para el año 2004.
4.- Informe sobre el 6º Congreso de Esperanto de la Unión Europea.
5.- Puesta en marcha de los nuevos cursos.
6.- Ruegos y preguntas.



Kunveno de vaskaj esperantistoj. Bilbao, 20/12/2003.

## Cobro de recibos del año 2004.

Todavía son muchos los socios que no han efectuado el pago de la cuota correspondiente al actual año 2004. Dadas las fechas en que nos encontramos, rogamos, a quiénes se encuentren en esta situación, que ingresen dicho importe en cualquier sucursal de la BBK, **sin olvidar indicar el nombre del socio que hace el ingreso**.

El número de cuenta, en la BBK, es: **2095-0141-41-2218001550.**
Y las cuotas para el presente año son:

| | |
|---|---|
| Normal: | 17,00 euros. |
| Especial: | 14,00 euros. |
| Familiar: | 30,00 euros (única, para todos los miembros de una misma familia). |

## Lotería de Navidad.

Como en años anteriores, pronto van a estar disponibles los recibos de la lotería de Navidad de este año. Siguiendo la tradición, estarán totalmente redactados en Esperanto y el precio de cada uno será de **3,00 euros**: 2,50 como juego efectivo en la lotería y 0,50 como donativo al Grupo Esperantista de Bilbao.

También atenderemos las peticiones que nos lleguen de fuera de Bilbao pero, en este caso, habrá que añadir, como **gastos de envío**:

5,00 euros para envíos dentro de España.
9,00 euros para envíos al extranjero.

El envío de los boletos se hará mediante correo certificado y **únicamente tras la recepción previa del dinero** en la cuenta del Grupo Esperantista de Bilbao:

Caja de Ahorros: **BILBAO BIZKAIA KUTXA**
Cuenta número: **2095-0141-41-2218001550**
IBAN: **ES51 2095 0141 4122 1800 1550**
BIC: **BASKES2BXXX**



## 6a EEU-Kongreso. Bilbao, 25/29 aŭgusto 2004.

Ankoraŭ varmaj la salutoj, kisoj kaj brakumoj, kiujn oni disdonis post la ekskurso al Gernika, kiel lasta ero de bunta programo, ne estas facila tasko resumi ĉiujn travivaĵojn, kiujn spertis la esperantistoj de Bilbao dum tiuj aŭgustaj tagoj, kiam vizitis nian urbon granda nombro de samideanoj el la tuta Eŭropo. Tamen, ni klopodos substreki la ĉefajn okazintaĵojn:

**Nombro de partoprenantoj**: 285, el 24 landoj.

**Amaskomunikiloj**. Aperis artikoloj en ĉiuj ĵurnaloj de Bilbao: "El Correo" (28 aŭg.), intervjuo al Eduardo Larrouy kaj ĉefartikolo en la centraj paĝoj; "Deia" (26 aŭg.), intervjuo al J. Miguel García; "Bilbao" (aŭg. 2004), intervjuo al J. Miguel García; "Gara" (24 aŭg.), du-paĝa artikolo kaj intervjuo al J. Miguel García; "Gara" (26 aŭg.), raporto pri la malfermo de la kongreso; "Berria" (26 aŭg.), artikolo okaze de la malfermo de la kongreso. Alie, estis reagoj de neesperantistaj legantoj, favoraj al Esperanto: almenaŭ, en "El Correo" (23 aŭg. kaj 31 aŭg.), en "Ieteroj al la Direktoro". Pere de la informagentejo "EFE", ankaŭ aperis etaj informoj en diversaj ĵurnaloj tra la tuta Hispanio.

Raportoj pri la kongreso aperis en la lokaj tevidĉenoj "Telebilbao", "Tele7" kaj "Canal Bizkaia"; ankaŭ en la vaska tevidĉeno "ETB" (hispane kaj vaske); en la nacia "TVE1" (loka elsendo), ... La 30an de aŭg. estis duonhora intervjuo al J. Miguel García en "Tele7" kaj la 23an de sept. nia Prezidanto estis intervjuata, dum duonhoro, fare de David Barbero, fama ĵurnalisto de la vaska televido "ETB" por la kulturprogramo "Forum".

Ĉiuj radiostacioj de Bilbao raportis pri la kongreso. Krom tio, estis personaj intervjuoj, per telefono, en multaj el ili: Radio Popular, Radio Euskadi (hispane kaj vaske), Radio Nacional de España, Radio Bilbao, Radio Nervión, Bizkaia Irratia, ...



**Rezolucio de Bilbao**.

La lastan tagon de la laborkunvenoj, antaŭ ol la fermo de la kongreso, estis aprobita la "Rezolucio de Bilbao", grava dokumento en kiu oni proponas "*ke la Eŭropa Parlamento starigu interpartian grupon por funde pristudi la nunajn eŭropajn lingvajn problemojn, la diversajn ekzistantajn solvojn kaj la eblecon proponitan por Esperanto*".

Samtempe, oni sugestas "*ke tiu prilingva grupo rapide iniciatu eksperimentojn – zorge kontrolotajn kaj mezurotajn de fakuloj kaj parlamentanoj – de uzo de Esperanto kiel traduk-interpreta pivotlingvo en la Eŭropa Parlamento, kaj ke ĝi konsilu al ĉiuj membro-ŝtatoj simile kontrolotajn eksperimentojn pri enkonduko kaj instruado de Esperanto en iliaj instrusistemoj*".

**Prelegoj**. Aparte substrekinda estas la alta nivelo de la prelegantoj: Michael Cwik (Bruselo), Toño del Barrio (Madrido), Antoaneta Nikolaeva (Sofio), Rafaela Urueña (bilbaoanino el Valjadolido) kaj Zlatko Tisljar (Kroatio); ne nur iliaj prelegoj estis vere brilaj, sed ili havis ĉefan rolon en la diversaj diskutoj kaj en la fina redakto de la "Rezolucio de Bilbao", kune kun aliaj elstaraj eŭropaj esperantistoj, precipe el Italio kaj Francio.



**La Prezidanto de UEA en la Kongreso**.

Renato Corsetti, la nuna Prezidanto de Universala E-Asocio (UEA), ankaŭ estis inter la kongresanoj. Li alvenis la 26an tagmeze kaj foriris la 29an matene; dum tiuj tri tagoj li havis la okazon partopreni diversajn kunsidojn, saluti la kongresanojn kaj ĉeesti la Ĝeneralan Asembleon de Hispana E-Federacio (HEF), al kies membroj dediĉis tre varmajn kaj kuraĝigajn vortojn.

**La ĉefredaktorino de pola radio ankaŭ en la kongreso**.

Barbara Pietrzak, ĉefredaktorino de pola radio (esperanta programo) oficiale reprezentis la varsovian radiostacion por fari ĉiutagajn raportojn pri la kongreso. Pere de telefono, ŝi havis la okazon intervjui la Prezidanton de la LKK, la Prezidanton de EEU, la Prezidanton de UEA kaj aliajn elstarajn partoprenantojn, kiel nia samideano Eduardo Larrouy. Samtempe, ŝi partoprenis la diversajn programerojn kaj, per la ekskursoj, havis la okazon raporti ankaŭ pri diversaj aspektoj de nia regiono.



Bilbao, 26/03/2004. La fama pola reĝisoro Roman Dobrynski vizitis Bilbaon kaj akompanis al Eduardo Larrouy kaj J. Miguel García fari diversajn demarŝojn ĉe la kongresejo "Eŭskalduna", cele al EEU-Kongreso.

## Esperanto oficiala laborlingvo en EU

Jena informero aperis en NUN:

Esperanto estis unuafoje laborlingvo en Eŭropa Unio, okaze de transnacia programkonferenco de la Radikala Partio, 7-8 dec 03 en Bruselo: la profesia interpretisto A. Tsirimokos Stakanovisme laboris dum 17 horoj! La Radikala Partio formaligis la inkludon de esperanto kiel EU-lingvon en sian programon por la balotoj 2004. Oficiala delegacio de la Esperanta Civito partoprenis en la konferenco, kaj intervenis aprezante la lingvouzon, la federisman modelon, la malfermon al minoritatoj, la principon de neperforto. Tamen la Civita Senato esprimos eventualan balotrekomendon nur fine de marto 2004.

Raportis: Esperanta Civito <pakto@freesurf.ch>

## Esperantistino en EU-parlamento!

La edzino de Georgo Handzlik (bardo sen barbo), al multaj konata Margareta, estas elektita eŭropa parlamentanino de Pollando! Do, elektiĝis esperantistino! Ŝian retpaĝon vi povas trovi ĉe http://www.malgorzatahandzlik.com kaj tie estas ligo 'esperanto' sub kiu troviĝas ŝia prezentiĝo esperantlingva.

Raportis: Irja Kaponen <esperanto@mac.com>

(Sendita el reta informagentejo "NUN")

## Pli pri la EU-parlamentanino

Georgo Handzlik sendis ĉi tiujn detalojn pri la elekto: 'Margareta ricevis pli ol 30.000 voĉojn. Tio apartenas al plej elstaraj rezultoj en la lando. Verŝajne neniu el kandidatoj ekster Silezio lokitaj sur la tria loko sur sia listo, ricevis similan kvanton. La minimuma nombro da voĉoj inter la elektitoj estas verŝajne 17.000. Neniu el la partioj krom CP akiris pli ol unu seĝo en unu elektoregiono. En Silezio CP ricevis 3 seĝojn. Tio estas la plej bona rezulto. Por ĉiu seĝo de Eŭropa Parlamento en Pollando kandidatis 38 personoj. Pollando havas 54 EU-parlamentanojn.'

Raportis: Irja Kaponen <esperanto@mac.com>

(Sendita el reta informagentejo "NUN")

## Esperanto en la plenkunsido de la EU-parlamento

En ĵaŭdo, 1a de aprilo 2004, la plenkunsido de la Eŭropa Parlamento en Strasburgo voĉdonis unuan fojon pri ebla rolo de Esperanto kiel aldona interlingvo de la Parlamento. La propono estas la ĝisnuna kulmino de la klopodoj pri Esperanto en eŭropaj instancoj, kiu

ampleksas jam dudekon da parlamentaj demandoj kaj unuopaj proponoj. UEA-prezidanto Renato Corsetti alvokas la EU-civitanojn rapide peti sian parlamentanon per mallongega retmesaĝo pri subteno. - Legu plu sur la novaĵpaĝoj de EsperantoLand.org http://www.esperantoland.de/novajhoj-interna/shanghnov.php?msgid=554

Raportis: Lu Wunsch-Rolshoven <Lu@EsperantoLand.org>

(Sendita el reta informagentejo "NUN")

## PRELEGO EN EŬSKLINGVA LERNEJO.

Mi estis en la eŭsklingva lernejo Begoñazpi, de Bilbao, invitita de Emilio Mañas (kies prapatro, nuntempe 92-jara, ankaŭ estis esperantisto). Tie, mi prelegis pri la Internacia lingvo al lernantoj 17-jaraj. Mi havis grandegan sukceson kaj minimume dek el tiuj montris sin volemaj esperantistiĝi. Mi donis al Emilio presaĵo kun la Bilbao-a metodo, por ke li ĝin disdonu al tiu, kiuj interesiĝos.

(Raportis: Patxi de la Hoz)

## TTT-ejo PRI ESPERANTO EN LA EŬSKA.

Kiel mi diris al vi dum la lasta kunveno mi havas interesan projekton informi pri la esperantaj aferoj en la eŭska; sed mi bezonas vian helpon por realigi ĉi tiu projekton; mia ideo estas traduki al la eŭska la plej gravajn novaĵojn de la movado en Eŭskio kaj en la tuta mondo por la homoj, kiuj parolas la eŭskan kaj por la amaskomunikiloj, kiuj uzas la eŭskan (egunkaria, lokaj revuoj, radioj, ktp) sciu plu pri la movado. Ĉu vi pensas ke povas esti bona alternativo por konigi la esperantan mondon?

Mi jam havas la ideon pri la TTT-ejo kaj pri la enhavoj, do, nun mi atendas vian kunlaboron por ĉi bela ideo. Tiu TTT-ejo havos ankaŭ ligojn al aliaj interesaj ejoj.

(Ricevita per retpoŝto el Natxo Apaolaza: apaolaza@parlam.euskadi.net)

## NI RIDU IOMETE.

VIVO KAJ MORTO

Policano haltigas veturigiston pro lia tro rapida veturado. Dum la policano aliras la aŭton, li vidas ke la viro estas tre nervoza.
- "Bonan tagon, sinjoro. Ĉu vi konscias kial mi haltigas vin?"
- "Jes, Sinjoro Policano....mi scias ke mi tro rapidiĝis - sed estas afero de vivo kaj morto!"
- "Ho, vere..? Kiel?"
- "Ĉe mia hejmo juna bela virino atendas min."
- "Hmm... Mi ne vidas kial tio fakte estas afero de vivo kaj morto."
- "Nu, se mi ne revenus hejmen antaŭ ol mia edzino revenas, mi estos mortinto!"

(Ricevita per retpoŝto el Israelio fare de Yael Selach)